nia afero, en la takso de SAT, eble eĉ flanke gvidantaj aŭ influhavaj socialdemokratoj neĝuste informitaj de malbonvoluloj aŭ kiuj momente estas iom skeptikaj kaj hezitas subteni nin aŭ ne laŭ merite konsideras SAT-on. Ne lasu timigi vin per la momenta ĝeno, ke eble enviuloj aŭ aliaj barantoj disfamigas en nia partio, ke SAT estas « komunista afero ».

La fondo de tutmonda proletaria esperanto-organizaĵo kiel SAT estis nepre necesa; ĝi estis, por tiel diri, « en la aero ». Do, krei novan asocion, estus vana klopodo, tute senutila perdo de fortoj kaj energio. Frakasi, detrui SAT-on, malhelpi ĝian normalan progreson, ne estas ia motivo por tio nune, kiam ties funkciuloj en Leipzig kaj Paris bone kaj lojale agas. Ankaŭ se aŭstrianoj gvidus tian asocion, ili baldaŭ vidus, ke la afero estas sufiĉe nedanka kaj ankaŭ ili ne kapablus, ĉiujn kontentigi, eĉ kun la plej bona volo. Ni konsideru, ke la SAT-funkciuloj estas personoj, kiuj post penplena profesia laboro ĝis malfrue en la nokto, idealisme, sen ia persona profito agas. Kredu al mi, ke ili estas malriĉaj proletoj. Ni do ne malfaciligu kaj baru al ili la jam sufiĉe dornoplenan taskon.

SINCERULO.

*(Daŭrigota.)*

## Pri esperanto-movado en Franclingvio

« Fédération Esp. Ouvrière » preskaŭ nenion faras, diris K-do Dneprano en la N-ro 90 de « S-ulo ». Ni devas protesti kontraŭ tia facilanima aserto. Estas ja vere, ke la rezultoj de nia propagando ne estas kontentigaj, sed tio ne signifas, ke ĝi estas malvigla. Nura legado de nia informo en « Kroniko » (N-ro 89 de « S-ulo ») montras ke ni ne preterlasas okazon propagandi. Lernolibroj estas aĉetataj grandkvante ; propagandiloj disdonataj malavare. Sed francoj ne emas lerni lingvojn. Al ili cetere tro ofte eksterlandanoj parolas franclingve. La francoj do aĉetas lernolibrojn, ĉar ili simpatias esperanton, sed tute ne lernas la lingvon. Ĉu estas eble perforti ilin ?

Dneprano ankaŭ bonvolu ne forgesi, ke ĉi-tie la klaskonscia parto de l' laboristaro ĉefe pensas pri la urĝaj ĉiutagaj taskoj en sindikatoj kaj partioj : « Ni unue preparu la Revolucion, ili diras, poste ni lernos esperanton ». Tia rezonado estas ja tre lama, sed kredu, ke ne estas facile ties malpravecon forigi.

Anstataŭ paroli tiel senpripense, Dneprano prefere notu bone en la memoron, ke la proporcio de SAT-anoj rilate al FEO-anoj (t. e. anoj de nacilingvaj asocioj) estas pli granda ol ie ajn.

Tial ke ni ne volus, kiel nia subjektiva kritikanto, misuzi lokon en « S-ulo » per pli longa respondo, ni nur konsilos al la Redakcio de nia gazeto, ke ĝi estu malpli akceptema por seupripensaj asertoj.

*Fédération Espérantiste Ouvrière,* 177, rue de Bagnolet, Paris (XX^e^).

# DIVERSAĴOJ

**IV-a kongreso de « Eduk-Internacio »**
Vieno (9, 10, 11, 12 Aŭg. 1926).

La Eduk-laborista Internacio, fondita en 1920, estas unueca organizo tutmonda, nun grupiganta 600.000 avangardajn edukistojn el ĉiuj landoj. Ĝi estas konata de esperantistoj (ĉar de komenco ĝi uzas esperanton por siaj internaciaj rilatoj) sub la mallongiga nomo : « Eduk-Intern ».

Pro manko de loko ni ne povas publikigi la tagordon de ĝia IV-a Kongreso ; sed ĉiuj interesatoj eksciu, ke sufiĉas al ili sin turni al jena adreso : L. Vernochet, sekr. de « Eduk-Intern », 33, rue de la Grange-aux-Belles, Paris (X^e^), por ricevi ĉiujn deziratajn informojn.

Tamen la SAT-anaro devas noti bone en la memoron, ke niaj K-doj Mark Starr (London) kaj Marcel Boubou (Orléans, Francio) partoprenos la kongreson kaj klopodos per kaj por esperanto.

★

**Radiuloj atentu !**

En la intenco plivigligi la radio-rubrikon en nia gazeto, K-do Henri Nicollet, 91, rue de Trion, Lyon-V^e^, konsentas preni sur sin la prizorgadon de tiu rubriko. Li alvokas al ĉiuj interesatoj interrilatiĝi kun li, en la celo starigi laborplanon. Antaŭen por ebligi baldaŭan starigon de Radio-Fako en SAT !...

★

**Kropotkina Muzeo en Moskvo.**

La SAT-anoj admirantoj de P. Kropotkin lastatempe ekĝojis eksciante, ke baldaŭ aperos en esperanto unu grava verko (Etiko) de l' fama revoluciulo. Ili denove ekĝoju : en Moskvo oni nun vigle klopodas por pliriĉigi la muzeon starigitan je lia nomo. Ĉi okaze la SAT-anaro estas varme petata helpi en tio per alsendo de libroj, gazetoj, fotoj ktp., unuvorte per ĉio rilatanta al la vivo kaj agado de l' genia pensulo.

Krom tio, en Moskvo stariĝis antaŭ nelonge komitato por fondo de muzeo je la nomo de M. Bakunin. Saman peton kiel supre ni direktas al la SAT-anaro, ĉar la 1-an de septembro estos aranĝata ekspozicio je la memoro de Bakunin en la Kropotkina muzeo.

Ĉiujn sendaĵojn oni adresu jene : Muzeo de P. Kropotkin, Kropotkina per. 6, Moskvo.

La K-doj dezirantaj ricevi ion rekompence skribu al Aleksandro Liljer, Brjanskaja 15-2, Moskvo.

★

La unua Paneŭropa Kongreso okazos en Wien de la 4-a ĝis la 7-a de oktobro 1926. Ĝi estas kunvokita de la Paneŭropa Unio kaj esploros la problemojn pri unuiĝo de Eŭropo. Notinde estas, ke en tiu kongreso esperanto ĝuos la saman rajton kiel naciaj lingvoj.

Informojn liveras : Paneŭropa Unio, Wien, I. Hofburg.

★

Ĉiu laborulo devas ekscii pri la teorio de S. Gesell, nome : « Libera Ekonomio per Libera lando (!) kaj Libera mono ». Estas facile ricevi informojn, sufiĉas skribi en esperanto al : Fhysiokatischer Hampfbund Berlin. C. 54. Sophienstr. 6. — Komuniko de SAT-ano 1857.

★

K-do Günter Daŭs, Averstr. 20. Wattenscheid i/w. Germanio, estas la sola SAT-ano en tiu urbo. Por vigligi la tiean movadon li deziras organizi ekzposicion ; oni helpu al li per sendo de poŝtkartoj, ktp., ktp.

★

Ĉe liberpensula kongreso okazinta la 5-an de julio en Neuchâtel (Neŭŝatel, Svisio), estis vigle diskutata la demando pri lingvo internacia. La angla kaj la latina estis proponataj . . Neniu decido rezultis. Ĉu tiuj « liberpensuloj » liberpensas ? — « 150 ».

# KRONIKO

**Argentino.**

*Buenos-Aires.* — Fondiĝis anarkista esp. grupo, gvidata de K-do A. Barrot. Argentina Esp. Asocio aranĝis tri kursojn : 60 p. — Baldaŭ aperos bulteno en hispana k. esp. lingvoj. — FONTAN.

**Aŭstrio.**

*Wien.* — La Aŭstria Lab. Ligo Esp. decidis sendi al nia VI-a 4-membran delegitaron. Tia decido esperigas, ke finfine oni ĉi-tie komprenos, ke ekster SAT ne povas ekzisti laborkapabla esp. movado tutmonda. — ERIK.

**Germanio.**

*Berlin.* — 12 el la 34 ĉi-tieaj SAT-anoj kunvenis, 25 — VI. — 7 aliĝoj al la Kongreso ; nur 2 aŭ 3 K-doj tamen povas forveturi. Ni planas revigligi la movadon en aŭtuno. — *483.*

*Mittweida, i. sa.* — Progresetas nia movado : La LEA-grupo havas 34 anojn ; bedaŭrinde el ili nur 9 aliĝis al SAT ĝis nun. En junio okazis ekzameno de la kursanoj : 5 ricevis libropremion. — *2924.*

*Essen.* — Funkcias 7 kursoj. Instruado per « Petro », kies 230 ekz. jam disvendiĝis. Tuta SAT-biblioteko enviciĝis la libraron de l' liberpensuloj. — *3414.*

*Meerane.* — Ricevis ni el Sovetio leteron kiun ni tradukis k. laŭtlegis en kunvenoj. Efiko bonega : kurso kun 15 p. (Lernlibro : « Petro » ). — *1097.*

**Sovetio.**

*Ivanovo Voznesenk.* — Alilandaj laboristinoj vizitis nian urbon. Inter ili unu (Odette Brier) scipovis esp-on. Bonefikis.

*Jalta.* — Dum junio okazis 4 lekcioj pri esp-o en diversaj lab. rondoj. Finiĝis kurso kun 32 gelern. — *5087.*

*Leningrad.* — En « Domo de kleriglaborantoj » parolis K-do Poniŝevski pri esp-o. La muzeo de l' Popola interligo akceptis proponon de K-doj Majnov k. Poniŝevski pri organizo de aparta fako por int. lingvo. Tiucele la muzeo uzos esp-on.

*Minsk.* — Vizito de K-do Michaliĉha, kiu raportis en partiaj kluboj pri la situacio en Aŭstrio. Intervjuoj aperis en gazetoj. — Dum nur unu semajno aperis en Blankrusia gazetaro 25 leteroj trad. el esp-o. — *603.*